

<p>1. La “Gevangenpoort » estas unu el la kvin restintaj pordegoj de la 15-a jarcento. Ĝis la komenco de la 20-a jarcento, la konstruaĵo estis utiligita kiel arestejo. Kelkaj malliberigitaj ĉizis siajn nomojn en la muron kiel memoraĵon.</p>	<p>2. La akvopordego daŭre funkcias dum alta tajdo. Traboj estas ŝovataj en la betonajn kavojn kaj la spaco inter ili estas plenigita per sablo. Tiu ĉi « kofro » baras la furiozan akvon kaj protektas la fortikaĵan urbon.</p>	<p>3. Sur D'n Bol oni povas vidi 3 riverojn per unu ekrigardo: Maas, Waal kaj Merwede. Kaj tri provincoj videblas: Nord-Brabanto, Gelderland kaj Suda Holando.</p>	<p>4. Ŝipoj estas renovigitaj kaj lanĉitaj en la historia haveno. La grandaj enlandaj transportŝipoj estas loĝataj.</p>
<p>5. Sur la urbomuro troviĝas la iama kazerno de la ĝendarmoj, kies meza parto estis uzata kiel policejo ĝis la fino de la 20-a jarcento. La plej fama policisto en Woudrichem nomiĝis Peĉjo Kraĵono. Ne mirigos vin ke li ŝatis pune protokoli.</p>	<p>6. Glacio estis stokita en la glacikelo [n-ro 20]. Vintre, glaciblokoj estis tranĉitaj de la urbofosaĵo kaj alportitaj ĉi tien. La fiŝvendistoj kutimis konservi la ĵus kaptitajn fiŝojn. La muroj de la glaciejo estas unu metron dikaj.</p>	<p>7. La « Jacoba van Beierenhuis » estas la plej malnova domo en la fortikaĵo. Packontrakto estis subskribita ĉi tie en 1419. Franciskanaj monaĥinoj vivis ĉi tie de 1965 ĝis 1985.</p>	<p>8. La 34 metrojn alta « Martinustoren » estis konstruita en la unua duono de la 15-a jarcento.</p>
<p>8+ La supraj du sekcioj originas de ĉirkaŭ 1530. La turo estas moknomita la mustardpoto. En la fino de la dua mondmilito, Hitler volis ke la turo estu eksplodigita, sed feliĉe en la lasta momento la pulvo, kiun la okupantoj konservis en la turo, estis forportita. Bedaŭrinde koste de la muelejo.</p>	<p>9. La Arsenalo, kiu estis konstruita en 1851, enhavas la fiŝkaptan muzeon. Antaŭe ĝi estis utiligita kiel stokejo por arma ekipaĵo. Tuj antaŭ ĝi estas la statuo de Jan Claessen, trumpetisto de la armeo de princo Maurits [1585-1615] kaj kanono el 1818. Ili estis parto de la nova nederlanda « akvolinio » (akvodefenda sistemo) ĝis 1955.</p>	<p>10. La blanka domo inter la arsenalo kaj la bovinpordego estis konstruita en 1856 kiel arma gardejo por soldatoj kaj oficiroj. Post la fermhoraj ĉiuj pagis por eniri la pordegon. La gardista domo ankaŭ funkciis kiel flegejo por ĥolero-suferantoj.</p>	<p>11. Farunmuelilo “Neniam imagita” estas ok-angula skafalda muelejo. Eksploddetruita, sed rekonstruita en 1966. En la muelilbutiko oni povas aĉeti produktojn el la faruno, kiun la muelisto muelas.</p>
<p>12. La du pulvokeloj el ĉirkaŭ 1850 estis utiligitaj kiel municio-stokejoj dum minacis milito. Ili estis rekonstruitaj en 2007 kaj nun enestas restoracio/trinkejo kaj B&B (L&M). Tiuj pulvokeloj ankaŭ estas parto de la heredaĵo de la malnova kaj nova nederlandaj « akvolinioj ».</p>	<p>13. La Romkatolika preĝejo estas 'Waterstaatskerk' konstruita en 1838 post la Batava Revolucio. En la niĉo de la fasado troviĝas statuo de la ĉeĥo Johannes Nepomuk [1350-1393], patrono de pontoj.</p>	<p>14. La kazerno, konstruita en 1854, estis la loĝejo por soldatoj kaj stokejo de ties ekipaĵo. De 1747 funkciis ĉi tie civila militservo. En la armeo devis servi sanaj viroj inter 18- kaj 60-jaraj..</p>	<p>15. Per pied- au biciklopramo iri al Slot Loevestein estas facile farite de ĉi tie. Se vi volas reiri, la ŝipa sonorilo sonos ĉe la geldera flanko de la rivero Maas.</p>
<p>16. De ĉi tiu punkto la salmfliŝkaptisto rigardas super la akvon al Gorinchem. La « fenda decido » celas certigi, ke salmoj de Norda Maro denove havu aliron al la riveroj. Eblas, ke la salmfliŝkaptado en Woudrichem povos denove prosperi.</p>	<p>17. Maldekstre de la konstruaĵo ĉe numero 46 estas la Witts-pordego. La jaro 1611 malkaŝas, ke ĝi ĉi tie jam staras pli ol 400 jarojn. Ĝi ŝuldas sian nomon al ŝtatestro Johan de Witt, kiu edziĝis en 1611 kaj havis sian oficejon ĉi tie.</p>	<p>18. La « Oude Raadhuis » [1592] estis la sidejo de la urbestro. Maldekstre de ĝi estas 3 malliberejoj, kiuj ankoraŭ estis uzataj ĝis la lasta jarcento.</p>	<p>19. La « Hoogstraat » estas la plej malnova strato en la fortikaĵo. Ĉirkaŭ 900 p.K. ĉi tie estiĝis setlejo sur la alta bordo laŭ la rivero.</p>

